

# Sennacieca Revuo

Oficiala Organo  
de Sennacieca Asocio Tutmonda

## LITERATUR-SCIENCA ALDONO

Antaŭe "La Nova Epoko"

### ENHAVO:

*L. Sejfullina*: Aleksandro Macedona. Trad. Nikodem. — *N. Nekrasov*: Krono de sonetoj pri Esperanto. — *A. Rajzen*: Ree juna. Trad. D. Eckstein. — *A. Sati*: Kremla sonorado. Muziknotoj. — *L. Trocki*: Arto de revolucio kaj socialisma arto. Trad. G. Dem. — *L. Revo*: Niaj literaturaj taskoj. — *Joh. Held*: Kulturhistoriaj vagadoj. Trad. W. Vaas



Redakcio: 1-a Tverskaja-Jamskaja, 35, kv. 5, Moskvo I (Rusio)  
Administracio: R. Lerchner, Colmstrasse 1, III., Leipzig-Stötteritz (Germ.)



# REDAKCIA ANGULO

Jam la unua kajero de nia "Aldono" venigis al ni revokojn el diversaj lokoj: — linioj da kamaradecaj kritikoj kaj konsiloj, linioj da kamaradecaj simpatioj kaj paĝoj da kunlaboraĵoj jam signas, ke formiĝas tiu laborkolektivo, multmilmembra kaj potenca, kiu estos la fakta kreanto de la "Aldono". Kaj nia redakta ĉelo, ie teritorie lokiĝinta, servu kiel kuncentrigejo de tiu literatura (vastasence) laboro, kiel liganta ĉenero inter la kunkreantoj, kiel transira momento inter la mensa laboro de la teritorie disigitaj kunmembroj kaj — la zumanta presmaŝino, mekanike ensorbanta niajn laboraĵojn kaj multmilope llin vastiganta tra la mondo kaj kune — la ĝojon de laborrezulto, la ĝuon de laboro. La "Redakcia angulo" servu do por nia interligo, resume ĝi respegulu la iron de nia laboro. . . .

. . . Inter la venitaĵoj ni trovas jenan proponon de k.do J. Zawada: "Dezirinde estus, ke . . . la Redakcio enkonduku konstantan fakon en la literatura parto sub la titolo "El la tuthomara *malnova* literaturo" aŭ simila. Per tio mi komprenas la ĉefverkojn de tutmonda literaturo, kiuj havas eminenta internacian, tuthomaran, do — sennaciecan tendencon kaj spiriton; en ĉiu nacilingva literaturo oni trovas tiajn verkojn — aŭ en formo de romanoj, noveloj aŭ de poeziaĵoj. Tiajn verkojn — kaj nur tiajn — la "Aldono" devus traduki entute aŭ parte, aŭ enpresigi eltiraĵojn, la plej ĉefajn kaj la plej proksimajn al niaj S.A.T.-ideoj; se k.doj de ĉiu lando traserĉos ilian nacilingvan literaturan trezoron, se ili redaktos biografiojn aŭ literaturistajn skizojn pri la plej tuthomaraj verkoj de iliaj aŭtoroj, ni post 2—3 jaroj estus povintaj kompili tre bonan lerno- kaj legolibron de sennacieca literaturo tutmonda. . . Ĉi-tiu propono neniel celas anstataŭi la *novajn* poetojn de l'Laboro kaj socia novordo, . . . nur celas ĝi kunligi la penson tuthomaran (neliberigitan, sklavigitan en naciaj kadraj) de l'Illeraŭ kun la literaturo hodiaŭa kaj morgaŭa".

Ĉu *principe* la propono estas kontraŭdirebla? Ja ne, ĉar tiuj altkulturaj homarecaj verkoj prezentas fundamenton, bazon de nia sennacieca literaturo kaj ilin kolekti, ilin konigi kaj studi estas unu el niaj taskoj. Kaj *praktike* — kamaradoj laboru por efektiviĝi la proponon, ne nur serĉante kaj tradukante tiajn verkojn, verkante literaturajn etudojn pri ili, sed ankaŭ helpante al nia administranto plidikigi la revuon, helpante al nia S.A.T.-kooperativo kreski por eldoni unu post la alia pli ampleksajn verkojn. Ni ĉiam memoru, ke *iu* ne faros por ni, sed nur ni ĉiuj kune devas (kaj ni ankaŭ pruvu, ke ni povas) fari la celajn. Kaj dume la paĝokvanto, tiu mezurilo de nia kolektivoforto, reguligu niajn intencojn kaj dezirojn. Ricevinte tradukon de ĉarma, pro sia respegulo sendifekta de la vivo kaj de la vivantaj homoj, novelo de *L. Sejfullina*, ni ne havis kuraĝon malakcepti ĝin malgraŭ ĝia amplekso — en kvar kvin kajeroj, bildo post bildo, ĝi pasos antaŭ niaj okuloj. Sed k.doj zorgu por provizi nin per mallongaj rakontoj, por ke ĉiam varia kaj multfaca estu la enhavo. Bone taŭgis la tradukaĵo de K.do L. R. (S. A. T. N.o 1887) . . . K.doj *N. Barthelmess* kaj *E. Mihalski* sendis riĉan poezian materialon — ĝi beligos kelkajn numerojn, kvankam ni elektis la plej belajn, same el versoj de *Tagulo*. La poemo de *A. Sati* kaj ankaŭ la literatura etudo de K.do *E. Mihalski* trovos lokon en proksimaj numeroj.

Kuraĝigaj estas ankaŭ kunlaboraĵoj por scienca fako — originala de k.do *D. Carbone* kaj interesa radioteknika rakonto, tradukita de *D.ro A. Fiŝer* — jam la proksima numero ilin enhavos. Aliaj k.doj ne forgesu tiun fakon en siaj zorgoj. Pri aliaj tradukoj de *D.ro A. Fiŝer* — ni rezervu al ni . . . la tempon por tralegi ilin — tiom abunde ili venis.

La Redakcio.





# ALEKSANDRO MACEDONA

SKIZA NOVELO

L. SEJFULLINA

*Mi dediĉas al Dmitrij  
Konstantinoviĉ Ĉudinov*

I.

Ĉefa estas la afero, la familinomo ne esencas.

Tion ĉi al li, ankoraŭ knabaĉo, kiam li en tepesejo ĉe Vysocki<sup>1)</sup> oficis, estis klariganta la malsupera kontoristo. Ne unufoje. Ofte.

— Mi en urba lernejo dum du vintroj lernis, do mi scias! Aleksandro Macedona estis tutmonda venkinto kaj imperiestro, kaj vi — malgrasnaskaĵo, kaj en via pasporto estas ankaŭ: Aleksandro Macedona. Nu, vi rezonu: al kio ĝi similas? Kaj ne tio nur, ke el la malnobeluloj, sed ke mem vi estas, kiel muso malsata. Tiu estis tutmonda imperiestro, kaj kiu vi estas? Ne eĉ voĉon homan, ekspiron fremdan vi timas! Ne, frato, ekstreme ironie oni vin nomis.

Malgrasa Aleksaĉjo palpebrumis la okulojn, ĉiam plenigitajn je timo, kaj mallaŭte estis ekspiranta responde. Kion oni povas tie ĉi diri?

Nur unufoje li fariĝis kuraĝa kaj diris, kvazaŭ petante, ke tiel estu:

— Sed povas esti, ke oni lin estimnomis ne Eŭdokimyĉ?<sup>2)</sup>

— Kiun?

— Jen tiun... la imperiestron...

La kontoristo ridekspiris tiel, ke papereto sur la tablo eksaltis.

— Nu ja malsaĝulo estas vi, Aleksandro Macedona! Eŭdokimo estas la nomo simpla popola. Neniel per ĝi la imperiestron oni povis estimnomi. Sed kian rezonon vi havas el tio?

— Sed povas esti... por distingi... oni tiam ne moknomos....

— Eĥ-ĥe, nenian komprenon en la cerbo vi havas, Aleksandraĉo! Kiu, kiam vin estimnomos? Por ĉiu ne estas malfacile pro moko vian

(1) Konata tefirmao en Rusio.

(2) Kutime rusaj kamparanoj nomas nur per propra nomo (ne familinomo), sed homojn maljunajn aŭ ĝenerale estimatajn, oni "estimnomas", aldonante al la nomo nomon de la patro kun sufiksoj "oviĉ" aŭ "yĉ", prezentantaj modifon de adjektiva formo: Eŭdokimo — Eŭdokimov (adjekt. formo) — Eŭdokimoviĉ — Eŭdokimyĉ.



pasporton memori. Kaj vi mortos, estante Aleksandro Macedona! Kiu do al vi malbonigis, kiam oni baptis vin? Nu, oni devus nomi vin Johano aŭ Stepano, jen vi havus la distingon. Sed jen, vidu — Macedona, kaj eĉ plie — Aleksandro! Ĉu pastro aŭ la gepatroj faris la amikservon al vi?

Ĉu li scias, kiu? La patrinon sole li memoras, sed ŝi kion povis



*Arĥipov*

*Lavistinoj*

diri pro maljuneco sia. Lavistino, do nure lavistino ŝi estas. Ŝi estis admonanta:

— Avo via estis psalmlegisto. Ĝis diakonposteno li ne finoficis, mortis kaj la infanojn naŭ li havis, kaj ĉiujn vivaj. Kie necesus, tie eĉ malsato ne prenas! La patro via, ŝajne, ja el la pastra rango, sed estante botisto eĉ, en alian mondon li foriris. Al mi li lasis kvaron da vi. Kaj ĉiuj estas Macedonaj. Kiel mi la nomon ŝanĝu? La dokumentojn, verŝajne, polico observas. Do scipovu ŝanĝi! Aleksandro estas nomo bona. Laŭortodokse estas donita... Sed ne

parolaĉu vi! Jen mi bategos, do vi ekscios, kiel oni la patrinon riproĉas! Dio — patreto, li suferas, kvazaŭ oni lin patrininsulte nomis<sup>1)</sup>. Mi lavas, lavadas pro ili la fremdan malpuraĵon, kaj ili malkontentas, kiel oni baptonomis ilin! Pereo por vi ne ekzistas!

Veron diris la kontoristo: per Eŭdokimyĉ ne multfoje oni lin nomis dum kvardek jaroj de la vivo. Ĉiuj: "He, kiel vin..." kaj ankoraŭ: "frateto mia". La vortoj estas bonaj, pri parenceco parolas. Nur per

(1) "Patrino" estas la plej forta insultaĵo en rusa lingvo.



---

malbona tono homoj eksciis prononci ilin. Kiam oni diras: "Transdonu, frateto!", "Vi, frateto mia, ne tro larĝe sidu"... pri parenceco ne estas penseble. La instruituloj, tiuj pli ofte laŭ la pasporto estis vokantaj: Aleksandro Macedona. Ne gravas. Se vi sur la teron aperis, do la brakojn kaj la kruojn vi movi devas. Kiel ajn oni nomu, vi turnu vin. Kaj Aleksaĉjo estis sin turnanta. Rigardante trans la ŝultro sur la paperetojn, legoscion li ĉe la kontoristo finlernis. Poste hejme li super libro kaj kajero turmentis sin. La patrino, kompatante, batis lin. Ne gravas, li sukcesis. Li lernis skribi legeble vortojn sur papero. Kiel la kontoristoj. Ne zorgante pri la gramatiko. La bienulo Ŝidlovski ridegis pri lia nomo. Pro la gaja momento, de ĝi alportita, prenis lin en sian apudurban bienon. Riĉa estas la bieno. Kun la uzinoj brandaj kaj bieraj, kun la produktejo lakta malproksime ĝi estas konata. Kaj en la bieno pro la sama nomo ridiga li ne forgesis lin. La oficon de malsupera kontoristo Aleksandro atingis. Sed la aspekto ĉiam timema kaj senimpona. Eŭdokimyĉ li ne fariĝis, malgraŭ ke ses infanojn li alvivis. Eĉ ti-kiuj pli malsupere restis, lin ne estimnomas. La plej-aĝa filino Elizabenjo kun indigno estis diranta:

— Do rektiĝu vi, paĉjo! Kial vi estas ĉiam, kvazaŭ per bastono iu al vi minacas? Se vi pli kuraĝa estus, pli facile ni vivus. Kaj tiel... tute egale, se eĉ Sidoro vi nomiĝus, oni trovus pri kio ridi. Oni kliniĝu nur, la homoj ĝis la tero alpremos.

Poste per insultado spasma, kriema sur la tutan familion ŝi la koleron estis elĵetanta. La ofendo, kiel malsano, eniĝis ŝin. Konsumigis kaj kvazaŭ maljunigis ŝin. Deksepjara, sed kiam ŝi la lipojn kunpremas, do la buŝo kiel ĉe la patrino fariĝas. Kun sulketo. El tria klaso de gimnazio, pro nepago por la lernrajto, oni eksigis ŝin. Ŝi bone lernis, sed la stipendiojn al aliaj, pli proksimaj al la estraro, oni donis. Kaj la patro ne sufiĉlaboris por la familio je ok buŝoj. Li kompatis la filinon, kulpeme li palpebrumis la okulojn. Per delikato korporemana sian kompaton li estis montranta.

— Filinjo, porapetitan tinkturon mi ricevis ĉe kuracisto. Se vi trinkus... Tro malgrasa vi estas.

— Lasu min!

— Aŭ se la kudradon vi forlasus? Ne gravas, ja pro malsato ni ne mortas! Antaŭ kristnasko plialtigo de la salajro...

— "Plialtigo!" Sed ne tuŝu vi min! La animon vi finturmentis!

La pordon ŝi brufermis kaj forkuris. La patrino ekspiris:

— Difektita ŝi estas, aŭ propramora... Mi eĉ paroli kun ŝi timas. Eĉ la mono por kudrado ne ĝojigas. Konsumiĝas la knabino! Eĉ dumfeste ŝi ne ripozas, ĉiam super libroj. Por kio lernigis vi ŝin? Antaŭe sen legoscio ni vivis, ja la pecon povis ni engluti! Kaj por



ŝia gorgo ĉio ne taŭgas. En la internajon ne eniras! Se iu ŝin kiel edzinon prenas. Sed kiu nun prenas? Rilate laboristojn ŝi kvazaŭ fraŭlino estas, sed al sinjoroj ŝi ne egalas...

Palpebrumis la okulojn la patro. Per kio li helpus? En sonĝo, unufoje, li vidis Elizabenjon ĝoja, edzinigita, kun infanoj li vidis ŝin. Ĉiam li deziris, ke ĉi-sonĝo ripetiĝu. Sed ne ripetiĝas ĝi. Ĵus antaŭ la carrenverso transloĝiĝis Elizabenjo en la urbon por kudri. Kiel kudristino ĉe la plej bona urba tajlorino. (Daŭrigota)

El rusa lingvo kun permeso de l'aŭtorino  
trad. *Nikodem*.

## *Krono de sonetoj pri Esperanto*

N. NEKRASOV

1.

*Solvita fine estas la problemo,  
Estinta longe malproksima cel':  
Etendas helan lumon la emblemo  
De la kvinpinta verdradia stel'.*

*Internacia idiom sistemo  
Ĉu estas nur petola bagatel',  
Abstrakta fantazio, belpoemo,  
Mirinda sonĝo, revo aŭ fabel'?*

*Ne, — kredas ni, ke baldaŭ tempo venos  
Kaj la homaro plene nin komprenos, —  
En la tutmonda evolustadi'*

*La teron ĉirkaŭkaptos kant' batala  
Per himno de fratec' universala —  
Triumfa Esperanto-melodi'.*

2.

*Triumfa Esperanto-melodi'  
Sonoru tra la urbaj stratoj, placoj,  
Solene manifestu sur podi'  
Vastiĝu larĝe sur plej grandaj spacoj!*

*Alarme veku el la apati',  
En kies tedaj kaj malviglaj lacoj  
La mondo dronis pro la tradici'  
De la malbelaj histori-grimacoj.*

*Sonoru ĥoro de la militir'  
Organizita orde kaj regule,  
Marŝanta energie kaj stimule.*

*Por la triumfa venka mondakir'  
El temp' antikva, kiam laŭ eposo  
La mondo estis mikso kaj kaoso.*

3.

*La mondo estis mikso kaj kaoso.  
En ĉiu bruo, sono kaj susur':  
Tamburis tondroj sur aeramboso  
Kaj violonis ventoj de natur',*

*En ĉiu guto de brilanta roso  
Tremetis enkaŝita uvertur' —  
Kaj apenaŭ tuŝo de elŝlosa  
Por larĝe ĝin malfermi mankis nur.*

*Kaj venis li, artisto kaj poeto,  
En la minuto de trankvil-kvieto  
Li prenis sonojn el miksita font',*

*Kaj per kombin' de harmonio-sento  
Ekludis li ravige tra l' silento  
Unuan muzikajon de l' estont'.*

4.

*Unuan muzikajon de l' estont'  
Ni ĉiuj kaptu per sentema aŭdo.  
Ĝi sonas kiel ĉarma lulrakont'  
Ofendus kiun fremda krudaplaŭdo.*

*Ĝi fluas melodie de sur mont'  
Sonante nur kun delikata plaŭdo,  
En sia vastaera horizont'  
Kantadon ĝi similas de alaŭdo.*

*Ho ĉiuj aŭdu, kiel sonas gut'  
Post gut' falante ofte — po minut' —  
De nia lingvo emo apogei.*

*Por kresku tiu apogea ton',  
Alkantu ĉiuj ni po eta son'  
Kaj helpu ĉiuj Esperanton krei.*



5.

Ho helpu ĉiuj Esperanton krei  
El plej malgrandaj eroj de la mond'.  
Ni ĉion ajne eblan por idej  
Enigu al trezora ĝia fond'.

Por ke ne povu la labor' perej  
Plejege zorgu pri interna rond',  
El kiu daŭru vaste spontanei  
De nia lingvo parolada ond'.

Mi scias, ke per pruntepren' ekstera  
De fremda ornamaĵo degenera  
Progresas nur kaduka vivkomfort'.

Al Esperanto nur per nutro kruda  
El la interno de la korpo nuda  
Maturas ega senrivala fort'.

6.

Maturas ega senrivala fort'  
En juna organismo delikata,  
Embriigita lerte en retort'  
De la doktor' kun risk' iniciata.

Ĉi kreskas preter minacinta mort',  
Kreaĵo de laboro akurata,  
Miraklo, plej mirinda de la vort',  
De ni zorgeme por la viv' vartata.

Ho, ankaŭ mi pasie kun fervor'  
Alpremas mian varmon de la kor'  
Al tiu kara lingva organismo.

Ho, mia lingvo, estu vi spegul'!  
Reflektu min en mia korobru'!  
Vi, Esperanto, estu mia prismo.

7.

Vi, Esperanto estas mia prismo,  
Tra kiu vidas mi el mia ĉel'.  
Tra vi mi vidas nigron de abismo,  
Tra vi mi vidas blankon de ĉiel'.

Kun vi konvergis mia organismo  
Kaj eble do pro tiu paralel'  
Mi mem en mia stranga egoismo  
Reflektas Esperanton en malhel'.

Ĉu estas mi individu' unika,  
Ĉu nura homarer, senkvalifika —  
Kaj kiun rolon ludas mia vers'?

Mi mian koron nur konscias bone  
Batadi samregule unutone  
Kun la grandega kor' de l' univers'.

8.

Kun la grandega kor' de l' univers',  
Kun la animo vasta de l' homaro  
Malsam', detal', aparto kaj divers'  
Ligitaj estu preter ĉia baro.

Ni rompu tiujn barojn en dispers'  
Kun bruo, skuo, krako, krevo, knaro  
Kaj renaskiĝu tiam post renvers'  
Universala nia solidaro.

En la muzeojn tiam portu ni  
Restaĵojn kriplajn de la tirani'  
De la kaos' de ĉiuj lingvoj homaj

Internacia nia dialekt'  
Kulturpotenca estos en efekt'  
Pli, ol iamaj formoj idiomaj.

9.

Pli ol iamaj formoj idiomaj,  
Pli ol nacioj ĉiuj sur la ter',  
En nova mond', en blovoj bonaromiaj  
Vastiĝu nova gento en prosper'.

Klasikan belon de l' artistoj Romaj,  
Teknikon de vapor', elektro, fer',  
Altecon de Nov-Jorkoj altadomaj  
Superos tiu gento en konker'.

En tiu ĉi barbara veninvado  
Kuniras mi, soldato-kamarado,  
Kaj portas mi anstataŭ kruda glav'

La belan lingvon por homaro tuta,  
Por ĉiu hom' ne estu surdemuta,  
Ne estu plu de la naturo sklav'.


10.

Ne estu plu de la naturo sklav'  
La hom' en siaj disciplin-principoj.  
Kun sia aroganta mensobrav'  
Jam ĉion venkis li per il-ekipoj.

Tekniko kaj scienco estis sav' —  
La homon kronis brilaj emancipoj.  
Nun lastan malbenafon de praav'  
Li jam forigu de sur siaj lipoj.

Ne plu balbutos strange indiĝen',  
Ne plu konfuzos falsa malkompren',  
Ne estos plu diverslingveco — premo.

Jam Esperanto bazis sin en fond',  
Jam ĝi vastiĝas tra la tuta mond',  
Solvita fine estas la problemo.





---

# REE JUNA

A. R A J Z E N

Estante dekdujara, Temke jam laboris ĉe Roza, la tajlorino; dekvarjara ŝi jam estis klaskonscia; kaj deksesjara ŝi jam strikis kun la ceteraj kvar knabinoj, kiuj laboris kune kun ŝi en la sama laborejo de Roza. La striko estis kun ĉiuj misteroj de granda striko. Unue — malpli da laborhoroj, anstataŭ deksex — dekkvar horoj; plialtigita salajro kaj, trie, traktado. Roza, la laborejmastrino, rajtas al neniu ci-diri.

Nature, la strikon oni ne gajnis, ne atentante, ke ili strikis ok plejnajn semajnojn. Sed Temke jam gustumis la ĝuon de batalo kaj ĝi plaĉis al ŝi.

Ĉe deksepjara Temke okazis jam revizio. La policistaro trovis ĉe ŝi tiufoje nenian nelegaĵon. La patrino kaŝis ĝin tagon antaŭe sur... subtegmento en potoj. Iru kaj serĉu. Patrino koro antaŭsentis la revizion.

Sed estante dekokjara, Temke jam estis konata kiel unu el la plej aktivaj socialistinoj. Estis jam al ŝi malfacile ricevi laboron, ĉar oni timis ke ŝi klaskonsciigos la knabinojn.

Estante deknaŭjara, ŝi jam loĝis neleghe en flanka strato de la urbo sub fremda nomo. Ŝi jam nomis sin por malfidindaj kamaradoj — Berta. Kaj se la proksimuloj iam ŝin nomis per ŝia propra nomo — Temke, — tio sonis, kiel aminda sekreto.

Elirante straton, ŝi devis esti singardema. Ŝi jam indis, ke spionoj ŝin akompanu, kiel malbonaj anĝeloj, je ĉiu paŝo. Ŝi kutimis ilin trompi tiel, ke la spionoj neniam povis scii, ĉu estas ŝi, aŭ ne. Ŝi kutimis povi en mezo de vojo dekapigi ĉapelon rapide, kiel sorĉistino, la ĉapelon meti en poŝon de la mantelo kaj meti sur la kapon tukon, kaj ŝi aspektis jam, kiel servistino... kaj la spiono ne povis ŝin rekoni.

Foje, kiam ŝi devis nepre iri al kunveno kaj iu vizitinto diris al ŝi, ke li pretas ĵuri, ke spiono observas la domon, — ŝi ŝmiris la vizaĝon per iomete da fulgo, surmetis malhelajn okulvitrojn kaj tiamaniere la juna, vivoplena Temke malsupreniris, kiel duonblindulino kaj kurbigita.

La spiono eĉ ne rimarkis ŝin. Dum la kunveno ŝi deprenis la okulvitrojn, forviŝis la fulgon kaj rakontis al la plej proksima kamarado, kiamaniere ŝi venis.

Por tiaj konceptaĵoj oni konfidis al ŝi la plej gravajn konspirajn laborojn ĝis la konservado ĉe ŝi de alvokoj por unua de Majo.

Ŝi sciis, kiel ilin ŝati. Por tia pakajeto da alvokoj oni povas iri je kvin jaroj Siberion<sup>1)</sup>. Ne al ĉiuj oni fidis tiaĵojn.

---

(1) Siberio estis en Rusio la ekzilejo.



---

Poste oni ŝin arestis eĉ por negrava revolucia ago; entute ŝi punsidis unu jaron en malliberejo. En malliberejo ŝi daŭrigas sian batalon. Ŝi estis la unua, kiu interparolis per fingroj tra la muroj, post kiuj sidis politikarestitaj. La unua ŝi kantis revoluciajn kantojn pri libereco kaj lumo en sia duonmalluma ĉelo... kaj kiam alvenis al malsatstrikio por pli bona traktado, ŝi persistis ĉiujn ses malsattagojn kaj jam baldaŭ svenonta ŝi ankoraŭ kantis sian kanton pri libereco kaj homa feliĉo.

Kiam ŝi eliris el la malliberejo, ŝi jam sentis, ke kaŝi nur alvokojn estas malgrave por ŝi... Ŝi jam estis inda gvidi la tutan malleĝan presejon.

Pro tio oni ŝin poste ekzilis Siberion.

Sed en Siberio ankaŭ estis sufiĉe da laboro kaj agado. Se oni nur havas la fajrerojn en la koro, eĉ la siberiaj neĝoturnoj kaj ventegoj ne povas ilin estingi; tamen, kiam venis okazo forkuri, ŝi hontis rifuzi.

Ŝi volis rekuri hejmen kaj gvidi sub nova nomo la agadon, sed pro miskompreno ŝi kun du ekzilitoj veturis Usonon.

Komence ŝi sentis sin en Usono kiel perdita; tie ĉi oni ne devas sin gardi... La unuan de Majo ŝi paradmarŝis kune kun la amaso. La demonstrado estis permesita de la konstitucio... La policistaro kuniris kaj kunrajdis sur ĉevaloj, ordigante la marŝantojn. Estis bele kaj malbele. Kio mankas tie ĉi? Estas kantoj, kaj estas standardoj, kaj la unua de Majo, kaj tamen la libereco ne plaĉis al ŝi.

Ŝi serĉis agadon... sed kie? Ĉu labori en sindikato? Oni jam proponis al ŝi 25 dolarojn semajne... Ŝi preferis labori en butikoj.

Ŝi sentas, ke ŝi pekas... kaj eble ŝi maljuniĝis kaj ne komprenas la novan landon, la novajn homojn? Jes, ŝi estas maljuna. Kial do ŝi tiel sopiras pri agado, batalo, akra kaj malpermesita vorto?...

Ĉu ŝi devas reveturi en la malnovan hejmon? Nur tie oni jam batalakiris la liberecon. De la malnova reĝimo ne restis postsignoj; male, tie ĉi, en Usono, io komenciĝas... jen oni dispelis mitingon, jen oni malpermesis standardon, jen la policistaro perforte eniris en laboristan klubon kaj faris arestojn.


Temke sentas, ke ŝi rejuniĝas... montriĝas laboro, estas eble, ke baldaŭ oni presos alvokojn malkaŝe kaj ŝajnas, ke unuan de Majo oni malpermesos marŝi. Ankaŭ aperis spionoj en la lando, ĉiuokaze oni parolas tiele...

Temke jam sentas, ke alvenas sankta tempo. Oni devos batali por liberigo, por la feliĉo de l'homaro. Ŝi estas ano de netute leĝa unuiĝo. Ŝi ĵurus, ke elirante de la unuiĝejo, ŝi estis postsekvata de iu... eble, ke oni ŝin arestos... nature ŝi tenos sin firme. Ŝi estas ree juna, samkiel foje tie...

Ŝi estas ree hejme.

El juda lingvo tradukis *D. Eckstein*.







# KREMLA SONORADO

POEMO DE ALEKSANDRO SATI


Majestel




1. Al Ok - ci - dent' el Mos - kvo flu - gas so - no - ri - la kant'; ĝi  
 2. Ho, flu - gu, mi - a kan - to tra fer - kra - doj de kar - cer', mik -  
 3. Al ti - u kant' re - so - nas e - ĥo ĉe la - bo - ri - star', ĝi



1. por - tas pri la mort' si - gna - lon al ri - ĉu - la band',  
 2. si - ĝu kun pro - le - ta - ri - aj ĝe - moj kaj su - fer' } Per  
 3. es - tos pre - ĝo en la bu - ŝoj de la in - fa - nar'.



fla - ma lang' pri ni - a sang' so - no - ru Krem - la kant'! Ĝi



flu - gu trans la va - lo, mont', ke bru - lu tu - ta mond', ke brulu tu - ta granda mond'!

Tiu ĉi poemo estas verkita de la hungara politika elmigrinto en Moskvo. Li estis inspirita de "La Internacio", kiun ludas per sonoriloj la turhorloĝo sur Kremla murego, super Spáski'a pordego. Dum la epoko de l'carismo tiu ĉi horloĝo ludis monarkian himnon "Gardu la caron di" kaj unu preĝon. Laŭ kruela moko de la historio la samaj sonoriloj alarmigas nun la tumondan proletariaron por batalo kontraŭ monarkiismo, burĝaro kaj eklezio. "Kremla sonorado" fariĝis kvazaŭ legendo en la buŝoj de eksterlandaj proletarioj kaj, trafinte Moskvon, ili rapidas per propraj oreloj konvinkiĝi pri ties vereco. La antikva turhorloĝo de sia alto observas kortuŝajn bildojn, kiam diversnaciaj proletarioj alpilgrimas al ĝia piedo por ĝui majestecajn sonojn de la proletaria himno.

V. Pol.



# ARTO DE REVOLUCIO KAJ SOCIA- LISMA ARTO

LEO TROCKI

Kiam oni parolas pri arto de revolucio, oni konsideras artofenomenojn de du specoj: unuflanke, la verkoj laŭteme, laŭsujete respegulantaj la revolucion; aliflanke, la verkoj ne ligitaj kun la revolucio laŭteme, sed penetritaj profunde de ĝi, kolorigitaj de la nova, el la revolucio elirinta, konscio. Estas tute okulvideble, ke tio ĉi estas fenomenoj, kuŝantaj aŭ almenaŭ povantaj kuŝi en tute diversaj facoj. Aleksio Tolstoj<sup>1)</sup> en sia verko "Migrado tra turmentoj" pentras la epokon de la milito kaj de l'revolucio; sed tio ĉi estas la skolo de *Jasnaja Polana*<sup>2)</sup>, ĝia rigardangulo, ĝia metodo, nur en skalo senmezure malpli granda. Kaj en apliko al la okazantaĵoj de la plej granda skalo tio nur pli akre memorigas, ke la *Jasnaja Polana* estis, sed delonge malaperis. Kaj kiam la juna poeto Tiŝonov<sup>3)</sup> verkas ne pri la revolucio, sed pri podetala butiketo, — pri la revolucio li kvazaŭ sin ĝenas verki (dume aŭ jam?), — li kun tia ĉreŝa kaj pasia forto konceptas kaj transdonas ĝian pasivan senmovecon, kiel tion ĉi povas fari nur poeto, kreita de la dinamiko de l'nova epoko. Se, tiamaniere, la verkoj pri revolucio kaj la arto de revolucio ne estas la samaĵo, do ili havas tamen la linion de kontakto. Artistoj, kreitaj de revolucio, ne povas ne ekdeziri diri pri la revolucio. Kaj, aliflanke, la arto, kiu forte ekdeziras diri pri la revolucio, senevite forĵetos la *Jasnaja-Polana*'an metodon, kiel la gravan, tiel ankaŭ la plebejan.

La arto de l'revolucio dume ne ekzistas, sed estas elementoj de ĉi arto, estas aludoj, provoj kaj, ĉefe, estas revolucia homo, kiu laŭ sia modelo formas novan generacion kaj por kiu ĉi-arto iĝas ĉiam pli necesa. Kiom da tempo estos bezona, por ke ĝi sendiskute evidentigu sin? Tie ĉi supozas estas malfacile, ĉar la procedo estas nepesebla, ne kalkulebla, kaj ni estas devigataj en difinado de limtempo eĉ por pli materialaj sociaj procedoj limigi nin per sortdivenado. Sed kial ĉi-arto, ĝia unua ondo, ne venu eĉ baldaŭ, kiel la arto de tiu juna generacio, kiu naskiĝis en la revolucio kaj kiu ĝin portas sur si antaŭen?

La arton de revolucio, kiu senevite respegulas ĉiujn kontraŭdirojn de l'transira societo, oni ne devas konfuzi kun la socialisma arto, por kiu ankoraŭ ne estas kreita la bazo. Aliflanke, oni ne devas forgesi, ke la socialisma arto elkreskos el la arto de l'transira epoko.

Persistante pri tia distingado, ni estas neniel gvidataj de ajnaj pedantecaj konsideroj de skemo. Ja nevene Engels estis nomanta la socialisman revolucion — salto "el regno de neceso en la regnon de libero". La revolucio mem ne jam estas la regno de libero. Kontraŭe, en ĝi la trajtoj de l'"neceso" atingas plejan disvolviĝon. Se la socialismo neniigas la klasajn antagonismojn

<sup>1)</sup> Moderna rusa verkisto; oni ne konfuzu kun Leo Tolstoj († 1910) kaj kun la poeto A. Tolstoj († 1875). Trad.

<sup>2)</sup> *Jasnaja Polana* — nomiĝis la bieno de Leo Tolstoj, kie li loĝis kaj verkis dum la lasta periodo de sia vivo. De ĝi ricevis la nomon ankaŭ certa skolo kaj verkmaniero inter rusaj verkistoj. Trad.

<sup>3)</sup> Moderna rusa poeto revolucia. Trad.



kune kun la klasoj, do la revolucio kondukas la klasbatalon ĝis la pleja streĉo. Dum la epoko de revolucio estas bezona kaj progresiva tiu literaturo, kiu helpas al kunigo de la laboruloj en la lukto kontraŭ ekspluatuloj. La revolucia literaturo ne povas esti ne penetrita de la spirito de l'socia malamo, kiu dum epoko de proletara diktaturo estas krea faktoro en la manoj de historio. Dum la socialismo la bazo de l'socio estos la solidareco. La tuta literaturo, la tuta arto estos agorditaj je alia diapazono. Tiuj sentoj, kiujn ni, revoluciuloj, nun ofte estas ĝenataj termini per ilia nomo — ĝis tia grado ĉi-nomoj estas fiuzataj de bigotuloj kaj trivialuloj: neprofitema amikeco, amo al proksimulo, kora kondolenco — ili sonas per potencaj akordoj en la socialisma poezio.


Ĉu ne minacas, tamen, kiel timas *Nietzsche*'anoj, la superfluo de l'solidareco per degenerado de homo en sentimentale—pasivan arecan estaĵon? Neniagrade. La potenca forto de konkurado, kiu en la burĝa socio havis la karakteron de merkata konkurado, ne malaperos, sed, parolante per la lingvo de psikoanalizo, sublimiĝos<sup>1)</sup>, t. e. akceptos pli superan kaj fruktondonan formon: ĝi fariĝos batalo por sia opinio, por sia projekto, por sia guto. Paralele al forigo de l'politika batalo — kaj en la senklasa socio ĝi forestos, — la liberigitaj pasioj direktiĝos laŭ la vojo de tekniko, de konstruado, enkalkulante tien ĉi ankaŭ la arton, kiu, certe, komuniĝos, maturiĝos, hardiĝos kaj fariĝos supera formo de perfektiganta vivkonstruado en ĉiuj fakoj, sed ne nur "bela" flanka alfarajo.

Ĉiuj flankoj de la vivo: terkulturado, planado de homa loĝado, kreado de teatroj, metodoj de socia edukado de infanoj, solvado de sciencaj problemoj, kreado de nova stilo enprenos la vivinteresojn de ĉiuj kaj de ĉiu. La homoj estos dividiĝantaj je "partioj" rilate la problemojn pri nova giganta kanalo, pri distribuado de oazoj en Saĥaro, — estos ankaŭ tia problemoj, — pri reguligado de vetero kaj klimato, pri nova teatro, pri kemia hipotezo, pri du interbatalantaj fluoj en muziko, pri plej bona sistemo de sporto. Tiuj ĉi grupiĝoj estos venenitaj de nenia klasa aŭ kasta profiteco. Ĉiuj estos egale interesigitaj pri prospero de la tuto. La batalado havos nure idean karakteron. Ĝi ne enhavos celadon de profito, malicon, perfidon, korupton, ĉion tion, kio konsistigas la esencon de "konkurado" en la klasa socio. Sed tio ĉi neniel malhelpos, ke la batalo estu enloganta, drameca, pasia. Kaj ĉar en la socialisma socio ĉiuj problemoj — inkluzive ankaŭ tiujn, kiuj antaŭe estis solvataj spontanee kaj aŭtomate (la moraro), aŭ estis sub gvido de apartaj pastraj kasto (la arto) — fariĝos posedaĵo de ĉiuj, do oni povas kun certeco diri, ke por la kolektivaj interesoj kaj pasioj kaj por la individua konkurado estos vastega kampo kaj senlima nombro da kaŭzoj. La arto ne suferos, sekve, mankon en tiuj kategorioj de l'socia nerva energio en tiuj kolektive psikaj impulsoj, kiuj instigas al kreado de novaj artdirektoj kaj al ŝanĝado de stiloj. Estetikaj skoloj, siavice, grupigos ĉirkaŭ si siajn "partiojn", t. e. grupiĝojn de temperamentoj, gustoj, menshumoroj. En tiu ĉi senprofitema kaj streĉita batalo sur ĉiam pli altiĝanta bazo de kulturo kreskos kaj poluriĝos en ĉiuj facetoj la homa personeco, kun sia netaksebla fundamenta eco: kontentiĝi pri nenio atingita. Vere, ni havas kaŭzojn timi nek pri endormiĝo de la personeco, nek pri komuniĝo de l'arto en la socialisma socio.

El rusa lingvo trad. *G. Dem.*

<sup>1)</sup> Sublimiĝi (AFIRH) — superiĝi.





S. Ĉeĥonin

Gravuraĵo

## NIAJ LITERATURAJ TASKOJ

L. REVO

### *1. Esperanto por la laboristoj!*

La fondo de SAT havas decidan, plej gravan signifon por la Esperantista movado, t. e. por la tuta mondlingva movado, ĉar praktike nur Esperanto, kaj neniu alia projekto, reprezentas la mondlingvan movadon. Per la konscia starigo de laborista, revolucia Esp.-organizaĵo, ekster kaj kontraŭ la konfuza, burĝdirektata, "neŭtrala" Esp.-movado, la lingvo internacia fariĝis unuafoje celkonscie aplikota elemento de la liberiga batalo de la tutmonda proletariaro. La kunigo de mondlingvo kaj de proletariaro formas kvazaŭ "asocion por reciproka helpo": ne nur mondlingvo utilas la laboristan klason; sed alprenante kaj subtenante internacian lingvon, la laborista klaso savos la movadon mondlingvan.

Nuntempe, en la brua disfalo de la kapitalisma sistemo kaj dume alproksimiĝas aŭdegeble la tondro de la proletaria revolucio, sonoras la mortsonorilego de la burĝa klaso kaj de la burĝa kulturo. Eĉ konsciaj burĝoj kontraŭmarksismaj, kiel ekz. la germana profesoro Spengler, devas konfesi la ekfinaĵon de la burĝa kulturo. Ĝi elspiris jam antaŭ la fino de la politika regado de l'kapitalo. Kiujn ŝancojn do havus Esperanto en la manoj de pereanta klaso? Ĉu lingvo internacia povas esperi praktikan realigon de klaso kies sola internaciismo, de Bismarck kaj Thiers ĝis nia epoko, kon-



---

sistas el kontraŭrevoluĉia, kontraŭproletaria helpo reciproka, internacie organizata? Kie uzado de *internacia* lingvo konsistas el senhonta apogo de imperialisma milito kaj de *nacia Ŝovinismo*, tie ne povas flori la venko de Esperanto.

El la senelira haoso de la kapitalisma pereco elkreskas pli kaj pli forta la sola potenco kiu kapablas trairi ĝis la fino la longan, penegan, kaj tamen unikan vojon de la savo. La klaso postvivonta la alfluantan diluvon, kiun ni nomas *socia revolucio*, estas la batalanta proletariato internacia. En siaj manoj ĝi portas la fierajn armilojn, per kiuj ĝi konkiros la eternan benon de l'homaro; ĝia koro prizorgas la sanktan fajreron, kiu ekflamigos brilantan nekonatan civilizacion en la nova, atingota lando; kaj en sia brusto ĝi tenadas ĉiujn savindajn trezorojn de la pasintaj kulturrepoko, kaj ilin ĝi kunprenas de la subakvegota nuntempo en la radian estonton.

Tiamaniere la proletariato savos ankaŭ Esperanton, la altvaloran juvelon de la estonta kulturo, el la pereco, kiu ĝin minacas. Mondlingvo povos venki nur per la laborista movado revolucia, aŭ tute ne. La internacia organizaĵo de proletariaj Esperantistoj revoluciemaj estas la sola progreselemento en la hodiaŭa mondlingva movado.

## II. Literaturo kaj socio

Ĉiu epoko havas sian literaturon. Literaturo kaj arto, gravegaj eroj de ĉiu civilizacio, dependas same kiel la aliaj branĉoj de intelekta kulturo, same kiel moroj kaj ideoj filozofiaj, politikaj, ktp., de la produktado kaj de la sociaj kondiĉoj de ĉiu epoko. Nur esplorante la samtempan kaj antaŭepokan aranĝon ekonomian kaj socian, ni sukcesos serioze studadi kaj klarigi formojn, ideojn kaj esprimojn de arto kaj de literaturo. Jen la ĉefa ideo de la materialisma historikoncepto (ekonomia determinismo) de Karl Marx.

Jam antaŭ Karl Marx ni trovas similajn pensojn ĉe la fama franca poeto Viktor Hugo, gvidanto de la franca romantikismo. Kiam naskiĝis kaj preciziĝis la romantikismo, Eŭropo dolore sopiris en la nigra nokto de reakcio kaj absolutismo, restarigitaj post la malvenko de la granda franca revolucio kaj post la militoj Napoleonaj. La burĝaro, senrajtigita de la feŭdalaj regantoj kaj tial ankoraŭ revoluciema, kontraŭbatalis absolutismon kaj aŭtokracion sub la celparoloj *liberalismo* kaj *demokratio*.

Tiam (marto 1830) skribis Viktor Hugo:

“La romantikiĝmo, tiom da fojoj malbone difinita, estas entute — kaj tio estas ĝia difino reala, se oni ĝin konsideras nur en ĝia batalanta senco — nur la liberalismo en la literaturo. Tiu veraĵo jam estas komprenata de preskaŭ ĉiuj inteligentuloj, kaj ties nombro estas granda; kaj baldaŭ, ĉar la laboro jam multe progresis, la *liberalismo literatura* estos ne malpli populara ol la *liberalismo politika*. Libereco en arto, libereco en socio — tio estas la duobla celo kiun devas aspiri egalpaŝe ĉiuj konsekvencaj kaj logikaj karakteroj... Literatura libereco estas ido de politika libereco... Nu, post tiom da grandaĵoj kiujn faris niaj antaŭuloj kaj kiujn ni vidis, ni eliris el la estinta formo socia; kiel ni ne elirus el la estinta formo poezia? Por nova popolo, nova arto...”

Kontraŭbatalante la klasikismon, formon de la kortega literaturo feŭdal-



socia, V. Hugo starigis la romantikismon sur la arta batalkampo de la revolucia, progresema burĝaro<sup>1</sup>).

Same kiel la burĝa klaso supreniĝanta kreis al si novan arton kaj novan literaturon, funde diferencajn de tiuj de la antaŭa epoko, tiel la proletaria klaso verkos arte kaj literature nek en la formoj, nek per la rimedoj, nek kun la ideoj de la ŝtoniĝinta, putranta kulturo de la burĝaro kontraŭrevolucia.

Arto kaj literaturo en la nova mondo estos proletariaj, kaj ĉar ili realiĝos en mondo de plej mallarĝa kunlaborado internacia, ili estos esence internaciaj, eble eĉ sennaciigontaj. En tiu nova kulturo, lingvo internacia estos nepre necesa cementigilo de la harmonia unueco de civilizacio tut-homara.

### III. "Kavaliroj de la Verda Stelo"

La Esperanto-literaturo trairis atentindan evolucion.

Kiam Esperanto naskiĝis, riĉega literaturo ĉiunacia estis amasiĝinta dum kelke da miljaroj. La pioniroj de nia lingvo, dezirbrulante je ĝia elprovo kaj praktika apliko, sin ĵetis fervore sur la literaturaĵojn de ĉiu speco kaj epoko, de ĉiu kulturstadio kaj evoluciŝtupo. Tradukaĵoj el diversaj klasikaj, romantikaj, realismaj, naturalismaj, mistikaj verkoj pliriĉigis nian literaturon. Esperanto-literaturo fariĝis iom post iom la resumo de la tuteco da literaturaĵoj depost la komenco de la kulturo al ni konata.

Al tiu tutmonda, ĉiurepoka kunfandajo aliĝis nova elemento eliĝanta el la epoko mem, kiu donis la vivon al Esperanto. Forigante la teknikajn barojn, kiuj dividis la popolojn, la kapitalismo kreis la kondiĉon, kaj generante la proletariaron, ĝi kreis la energion por formiĝo de internacia kulturo. Samtempe kun Esperanto, naskiĝante el la sama materia fundo kaj el la sama spirito, reciproke kunagante kun ĝi, kreiĝis la pacifista movado. La kulto de la "interna ideo", de nobla homaranismo, kreskis en la Esperanto-movado kaj esprimiĝis pli kaj pli klare en nia literaturo.

Tiam estis la florepoko de la "kavaliroj de la verda stelo", kiel ilin nomis la kamarado Nekrasov, en "LA NOVA EPOKO"<sup>2</sup>). La defendantoj de la pacifisma idearo, batalantaj por arĥimoderna afero, transformiĝis en mezepokaj kavaliroj, svingante la glavojn kaj jurante morti por la sankta ideo. Tia maskiĝo estas karakteriza trajto de ĉiu paŝo de burĝa progreso. Pacifismo estas esence burĝa movado: ĝi do progresas sub specife burĝaj aspektoj, kiel trafe ilin pentris Karl Marx en sia fama verko "La 18a Brumaire de Louis Bonaparte":

"La homoj faras sian propran historion, sed ili ĝin faras ne libervole, sub kondiĉoj ne mem elektitaj, sed ekzistantaj, donitaj, hereditaj. La tradicio de ĉiuj mortaj generacioj pezas kvazaŭ presonĝo sur la cerboj de la vivantoj. Kaj ĝuste kiam ili ŝajnas okupataj je transformado de si kaj de la mondo, je kreo de ne ankoraŭ ekzistantaj aĵoj, ĝuste en tiaj epokoj de revolucia krizo, ili timeme elvokas al sia servo la fantomojn de la pasinteco, prunteprenas iliajn nomojn, batalparolojn, kostumojn, por ludi la novan scenon de la mondhistorio en tia respektinda travestio kaj per tia prunteprenita lingvo. Tiel Luther maskiĝis kiel la apostolo Paŭlo,

<sup>1</sup>) Estas notinde, ke malgraŭ komuna nomo kaj certaj komunaj trajtoj la franca romantikismo profunde diferenciĝas de la romantikismo de la germana literaturo. Socie la germana romantikismo signifas ne kontraŭstaron al feŭdalismo, sed lastan eklumiĝon de feŭdala, mezepoka spirito.

<sup>2</sup>) Aprilo—junio 1923.



---

la revolucio de 1789—1814 travestiis sin alterne kiel Romaj Respubliko kaj Imperio, kaj la revolucio de 1848 parodiis samtempe la jaron 1789 kaj la revoluciajn tradiciojn de 1793—95.“

Do estas tute ne mirige ke la “kavaliroj de la verda stelo“ batalis per kavaliraj armiloj kaj kun mezepoka fantazio por la nobanimaj celoj de la esence burĝkarakterata pacifismo. Tiu pacifisma tendenco ankoraŭ malpli mirigas, se oni konsideras ke tiam (1907 ĝis 1914) eĉ en la kampo de la socialismo ne estis ankoraŭ okazinta la diferencigo inter burĝa pacifismo kaj socia revolucio. Esceptinte kelke da personoj izolitaj (Rosa Luxemburg, Lenin) neniu komprenis la fundan karakteron de la imperialisma epoko.

Kaj la kavalira vestaĵo, la kavalira batalo por la altaj idealoj de la homaro, naskis en la animo de la kavaliroj ankaŭ kavaliran karesemon kaj delikatajn amsentojn. Estis la tempo kiam meze en renkontigo de klasikismo, realismo, ktp., en Esperanto-literaturo floris plej bele kaj plej lukse el ĉiuj la “blua floro“ de la romantikismo. Pli kaj pli kreskis la nombro de la originalaj verkoj.

Ni ne moke kritiku la tiaman tempon, kiel faris la kamarado Nekrasov en “LA NOVA EPOKO“. La verkistoj de la unua florperiodo de la literaturo Esperantista meritas nek nian mallaŭdon nek nian mokon. Ili esprimis la spiriton de sia tempo, kaj tiun spiriton ili ofte belsone kaj klasike tradukis. Se hodiaŭ burĝa pacifismo estas ridindaĵo, delonge enterigita de la kruelegaj faktoj de senkompata historio, ni ne forgesu ke tiam la plej sincera volo, ne ankoraŭ sufiĉe klariginta, de ĉiuj socialistoj, escepte kelke da plej sagacaj cerboj, estis pacifista, simple pacifista...

Kial ataki Georgon Deŝkin pro tio kion li skribis antaŭ pli ol dek jaroj? Certe, se li hodiaŭ prikantus pacon sen revolucio, homaramon sen forigo de ekspluatado, li meritus mokon kaj ridindigon. Sed ĉu ni rajtas moki pri la florbukedo de lirikaj verkoj, kium li donacis al la Esperanto-literaturo kaj kiu tie okupas altan, konsiderindan lokon?

Novaj taskoj staras hodiaŭ antaŭ ni. Ni juĝu la verkistojn laŭ la plenumo de tiuj novaj taskoj kaj ni ne mezuru iliajn malnovajn verkojn laŭ la deziro, bezono kaj neceso de la nuntempo<sup>1)</sup>. (Finota).

---

## KULTURHISTORIAJ VAGADOJ

JOH. HELD

(Fino)

*Sur la postsignoj de plej antikva kulturpopolo.* Frutempe jam, je fino de lasta glaciepoko, la per la mondmilito konatiĝinta Mesopotamio — la durivera lando — taŭgis por homa koloniigo. Unue stepo estiĝis tie — en frua aluvialepoko, per superakvigoj de la riveroj Eŭfrat kaj Tigris — fekunda terfundo bone taŭga por instigi la homon al restado. Alternis vastaj

---

<sup>1)</sup> K-do Nekrasov petas nin konigi, ke li tute ne celis per siaj literaturaj etudoj “moki“ la pionirojn de nia juna literaturo. Li nur intencis plej klare evidentigi diversajn momentojn en ĝia disvolviĝo, anstataŭ ĉion apróbi kaj ĉion konsideri bona. Se li estis iom ekstrema en sia juĝo, tion li bone konscias, sed tio utilu kiel plia vigligilo. Speciale k-do Revo iomete eraras pri Deŝkin, kiu ĝuste nun, malgraŭ ses jaroj de la revolucio daŭrigas siajn temojn. Cetere Deŝkin sendube havas meritojn por sia epoko en la historio de l'Esperanta literaturo. Red.



---

herbejoj kaj ĉiam verdaj arbaroj, loĝataj de grandbestoj, kiel elefanto, leono, urso ktp., la herbejon vivigis sovaĝa ĉevalo, gazelo kaj aliaj bestoj de la kampo.

La persia golfo, en kiun la ambaŭ riveroj enfluas post ilia unuiĝo, komence de aluvialepoko, — t. e. komence de la plej novaj sedimentoj aŭ pli bone dirite: de nia epoko — eble etendiĝis pli profunden en la kontinenton; estas supozeble, ke la unuiĝloko de ambaŭ riveroj iam estis la limo de la maro, tiel ke ĉiu el la du riveroj enfluis unuope. Tamen dum la miljaroj la riveroj amasigis tiom da teraĵo — precipe Eŭphrat transportas multegon da ŝtonetaĵo kaj teraĵo el la Kurdistan-montaro — ke estis forluktitaj grandampleksaj, nune plej fekundaj, kampoj. Verŝajne dum postglaci-epoko okaziĝis en la enfluejo de Eŭphrat tiuj naturfenomenoj, pri kiuj la tradicio raportas kiel pri plej terura okazintaĵo. Ni aludas tiun antikvan fabelon pri superakvego, fabelon de orientaj prapopoloj, fabelon, kies postsignoj ankoraŭ nuntempe fantomas en la kapoj de spirite neprogresemaj homoj. En ĉi tiu fekundega lando — paradizo laŭ biblio — ni serĉu unuan ekeston de konstatebla kulturo, nun jam delonge disfalanta kiel rubo kaj polvo; tiu kulturo estiĝis, kiam komenciĝis la unuaj al ni historie konataj popolmigradoj. La komencon de homa koloniigo de Mesopotamio, precipe de ties suda parto, ni povas difini proksimume je 8—9 miljaroj antaŭ nia kronologio. Migremaj gentoj unue travagis tiun landon, poste restadis; dum pli juna ŝtonepoko estiĝis pluraj urboj — multenombraj trovitaĵoj en la biblie konataj regionoj Kaldu kaj Elan atestas tion — kiuj iom post iom pligrandiĝis kiel malgrandaj agrikulturŝtatoj.

Sur tiu sankta fundo de homa evoluado ni renkontas kredeble la plej maljunan kulturpopolon, la Sumer'anojn. Ampleksaj elfosadoj, okazigitaj de eminentaj esploristoj, ekz. *Morgan, Gantier, Lampe* k. a. inter la fluejoj de Eŭphrat kaj Tigris kaj orienten, en suda Babilono kaj Sumiro, liveris la pruvon, ke la tuta, poste tiom alta kulturo Asiri-Babilona konstruiĝis sur pli malnova, nome sur la Sumer'a kulturo. Ĉefe en ĉirkaŭaĵo de Kut-el-Amara — konata pro la kapitulaco de angla generalo *Toonshend* — la esplorborsado estis tre sukcesa. Multaj ruinaĵoj de iamaj urbo kaj vilaĝo pruvis, ke tie, jam en malhela pratempo, altkultura popolo terkulturadis, ke ĝi konis, eble eĉ inventis la produktadon de bronzo. Precipe miloj da traserĉitaj tomboj liveris antropologie gravan materialon. Ĉar tiu popolo, la Sumer'anoj, konstruis siajn loĝejojn el simple sekigita argilo de la riverdelto — la arton brulfari brikojn oni ne jam sciis — estas kompreneble, ke tiaj konstruaĵoj rapide disfalis. Post longa tempo restis de tiu kulturloko nenio krom amaso du rubo, sur kiu postvenintaj gentoj ree konstruis siajn domojn. Tiel estas klarigeble, ke supre nomitaj esploristoj kelkloke konstatis 4—6 diversajn koloniojn, unu sur la alia. Sian ĉefsidejon la Sumer'anoj — antaŭsemida popolo — okupis en *Ur*, la lando de laŭbiblia Abrahamo, en Larso, Lageŝ (ankaŭ "Tello" nomita) kaj en Susa, ĉe la persia limo hodiaŭa. Antikvaj skulptaĵoj montras al ni ĉi tiujn Sumer'anojn kiel mezgrandan homrason kun malalta frunto kaj iom oblikvaj okuloj. Tial oni opinias, ke ili estis enmigrintaj el interna Centralazio, eble el Turkeŝtano. La fakto, ke ili funkciigis nomindan kupro- kaj bronzoindustrion, pravigas la konkludon, ke ili devenis el la minajriĉa Turkeŝtano.

Strange estas kaj ĝis nun ĉe neniuj prapopolo observite, ke kaphararon kaj barbon ili forrazis, kiel estas videbla el trovitaj statuoj. La nazo, mallarĝa, pinta, larĝa kranio atestas, ke ili ne estis semidoj. Do popolo



---

ege superanta laŭ korpa stato — ne kalkulinte la kulturon — siajn najbarojn. Sed, kio ĉefe pravigas la rigardon al la Sumer'anoj, kiel al eminenta kulturpopolo, estas la fakto: ilin ni devas vidi kiel inventintojn de la kojnaj literoj. Poste enpenetrantaj kaldeanoj akceptis kaj plibonigis tiun skribmanieron. Jam ĉi tiu fakto: la perado kaj disvastigado de lingvo per signoj kaj la — kun tio ligita — influo al la tutpopolo montras al ni la spiritaltecon de tiu popolo kaj ni komprenas, kial homa kulturo eliris ĝuste el ĉi tiuj antikvaj lokoj de homarhistorio.

Sur kia ŝtupo spirita troviĝis tiu popolo, oni vidu el tio: ĝi posedis kalendaron, septagan semajnon, same ĝi dividis la tempon — kiel ni — laŭ horoj, minutoj, sekundoj.

Diversaj trovitaĵoj, precipe kalkulsignoj sur elfositaj kolonoj en la sama Tello, ekkonigas, ke Sumer'anoj ankaŭ sciis pri astronomio, ke ili observis la iradon de la astroj. Sekve ni rigardu ilin kiel la unuajn astronomojn. Vico da plej strangaj bildoj de suno, aliaj koncernantaj la sunon kabalaj signoj pravigas nin konkludi ĉe ili sunadoradon. Komprenoble: la suno estis — kaj estas — al terkulturanta popolo la donacanto de ĉia vivo kaj kio estas pli natura, ol ke la adorado de naturpopolo unuavice turniĝas al fonto de ĉia estado?

La supro de Sumer'a kulturo kredeble estis atingita en la jaroj 5000—4000 antaŭ Kristo. Precipe la keramiko, ĝiaj multspece ornamitaj produktaĵoj ebligas al ni profunde enrigardi la porartan senton de tiuj antikvorientuloj. Antaŭ ĉio la kupro — epokaj vazoj kaj elargilaj ujoj de *Mussian* — oriente en la lando — mirigas per vere arta pentraĵo.

Proksimume 3500 antaŭ nia kronologio ekaperis apud la Sumer'anoj alia popolo Akkade'oj, pure semida raso, tre verŝajne jam frumtempe enmigrinta el nordorienta Arabio. Migremaj paŝtistoj militemaj, ili diferenciĝis per la kostumo, zorge flegitaj barbo kaj hararo kaj ĉefe per la tipa "judnazo" kiel aparta popolo kun evidentaj rasrimarkaĵoj. Baldaŭ intime ligitaj kun la Sumer'anoj ili akceptis ties akiraĵojn; precipe la skribpovon ili progresigis. Same la metaltekniko prosperis sub iliaj lertaj manoj. Poste, sub la "reĝo" Sargon ili sukcesis venki la Sumer'anojn kaj fondi la regnon de Akkad, etendiĝantan de Eŭphrat ĝis Mediteranea maro. Longjaraj bataloj pro la regado inter ambaŭ popoloj maldensigis la loĝantaron, kaŭzis kelktempan malprogreson de la kulturo kaj dum ĉi tiu epoko neniu paŝo antaŭen estas konstatebla.

Jafoje la Sumer'anoj sukcesis rompi la potencon de Akkad kaj akiri supran regadon dum pli longa tempo. Sed pereado de tiu nura agrarŝtato estis decidita, kiam je 2000-a jaro antaŭ Kristo el nordo la forta popolo de Kaldeanoj kun siaj ferarmiloj sekvis la fluejon de Eŭphrat kaj post subigado de Sumir kaj Akkad fondis la babilonan regnon. La ekonomiaj kaj sociaj cirkonstancoj estis elfunde aliigataj kaj ricevis ĉefe babilonan aranĝon. La iam liberaj gentoj, arde amintaj sian nutrigan terkulturon, malaperis en la granda mondregno babilona. La kutima dum miljaroj adorita sundio — estis anstataŭata de *Mardoch*, la mondlumo de Babel, la plej alta kaj potenca de ĉiuj dio.

El "Neues Leben" (Nova vivo), ĵurnalo de liberpensula unuiĝo germana,  
trad. W. Vaas.





**ĈIU KAMARADO AĈETU**  
**DOKUMENTOJ DE**  
**KOMUNISMO**

kun antaŭparolo de KALININ

enhavanta kvar partojn kun portretoj de:  
Kalinin, Marx, Lenin kaj blazono de R. S. F. S. R.

- I. La komunista manifesto (Karl Marx kaj Friedrich Engels) . . . . .
- II. Programo de l' Rusa Komunistpartio (Elrusigis M. Krjukov) . . . . .
- III. Konstitucio de Ruslanda Sozialista Federacio Soveta Respubliko (Elrusigis G. Rozenblat) . . . . .
- IV. Manifesto de la Komunista Internacio al la proletarioj de la tuta mondo . .

en delikata arango kaj bele aspektanta, forta kovrilo

---

---

**SEPARATA ELDONO**  
**KOMUNISTA MANIFESTO**

---

---

KUN ANTAŬPAROLO DE  
D.ro EMIL PFEFFER



**DREZOJN VIDU SUR LASTA PAĜO**



# ELDONAĴOJ DE S. A. T.

Aĉeteblaj ĉe Administracio: R. Lerchner, Colmstrasse 1, III. r.  
Leipzig-Stötteritz (Germanio) — Poŝtĉeka konto n.º 6835

	fr. svis.	fr. fr.	Mk. g. or.
<b>Goethe-Faŭsto I</b> trad. Barthelmess broŝ. . . . .	1,80	4,—	0,80
..... bind. . . . .	3,50	7,—	1,30
<b>Eklumo en Abismo</b> trad. Else . . . broŝ. . . . .	1,50	3,—	0,60
..... bind. . . . .	2,80	5,—	1,10
<b>Ni legu</b> kompilita de Brunulo . . . . .	1,60	3,—	0,65
<b>Tri verkoj de Tolstoj</b> trad, J. M. . . . .	0,70	1,50	0,35
<b>Dokumentoj de Komunismo</b> . . . . .	1,80	4,—	0,80
<b>Komunista Manifesto</b> . . . . .	0,50	1,20	0,25
<b>For la neŭtralismon</b> de Lanty (II <sup>a</sup> el- dono) . . . . .	0,30	0,75	0,15
<b>Malnovaj n-roj de Sennacieca Re- vuo</b> (propagandcele) po ekz. . . . .	0,10	0,25	0,05

## LIVERKONDIĈOJ

La livero okazas **nur post antaŭa pago**. Oni pagu **nur per naciaj monbiletoj**. Poŝtmarkoj kaj respondkuponoj ne estas akceptataj.

## RIMARKIGOJ PRI PREZOJ

Modifoj de la prezoj estas rezervataj.

La **unua** prezkolono montras la prezojn por bonvalutaj landoj en svisaj frankoj. La **dua** por mezvalutaj landoj en francaj frankoj. La **tria** por kurzsuferantaj landoj en germ. markoj oraj: **1 dol. = 4,20 Mk. g. oraj**, pagebla laŭ la taga kurzo en pap. mono.

Por sendkostoj oni aldonu **10%** de la pagota sumo.  
S.A.T.-anoj sciigantaj la membro-n.ron rajtas depreni **nur 1 ekz.** de ĉiu speco kun **20%** rab.